Kiel vojaĝi de la flughaveno al kongresejo/hoteloj?

La 96-a Universala Kongreso okazos en la foira konstruaĵo Bella Centro. Se vi rezervis lokon en unu el la hoteloj pere de UEA, ili situas tuj apude. Do estas la sama itinero.

De la flughaveno oni atingas Bellan Centron plej rapide pere de la regiona trajno kiu de Svedio veturas al:
- Elsinoro (Helsingør) aŭ
- Kopenhaga Ĉefa stacidomo (København H) aŭ
- Nivå (Nivå)

La trajna stacio en la flughaveno situas sube de la alvena terminalo 3.

Oni devas uzi bileton por 2 zonoj kaj aĉeti gin ĉe la DSB biletoficejo kiu situas en la terminalo apud la subiro al la trajno.
La biletoj por ĉiuj transportiloj validas dum unu horo.

Veturu ĝis la stacio Ørestad (la dua post la flughaveno).
Ĉe la stacio Ørestad situas la hoteloj Cabinn Metro kaj Crowne Plaza.

Por atingi Bellan Centron kaj la hotelon Bella Sky prenu la metroon ĉe stacio Ørestad en la direkto Vanløse. La metroo situas supre de la trajna linio kaj veturu nur unu stacion al Bella Centro kaj Bella Sky.

La studenta domo (Håndværker-Skolehjemmet)
Ĉar oni ricevos la ŝlosilon al la ĉambro en Bella Centro, oni devas nepre sekvi la supre menciitan itineron: trajne ĝis Ørestad kaj kun metroo al Bella Centro. Aĉetu bileton por 2 zonoj.
Poste, por atingi la Studentan Domon, oni devas preni la metroon ĉe la Bella Centro ĝis la stacio Flintholm kaj de tie preni la S-trajnon, linio F, en la direkto Ny Ellebjerg al stacio Vigerslev Allé. Vidu la mapon sube por trovi la Studentan Domon.
Aĉetu bileton por 2 zonoj.

La supre menciita metodo estas la plej rapida kaj malmultekosta metodo vojaĝi al la kongresejo kaj la studenta domo.



Kiel vojaĝi de la ĉefa stacidomo al la kongresejo?

Trajne: Prenu la regionan trajnon por Svedio kaj haltu ĉe la stacio Ørestad. Ĉe la stacio Ørestad iru supren al la metroo kaj en la direkto Vanløse veturu unu stacio al Bella Centro.
Aĉetu bileton por 2 zonoj.

Parkumi ĉe la kongresejo?

Oni povas parkumi ĉe la Bella Centro. La pagenda tarifo tie kaj ĉe la apudaj hoteloj estas cirkaŭ €10 tage.